

La Suda Kruco

Oficiala Organo de la Australazia Esperanto-Asocio.

Redakcio-Administracio :

Box 731F, Elizabeth-str: P.O.,
Melbourne (Aŭstralio).

Abono (por dek du numeroj) :

Aŭstralio: 4 ŝilingoj kaj 6 penco.
Ekster Aŭstralio: 5 ŝilingoj

Unu numero: 4 penco

Anoncoj: Por 3 linioj: 1 ŝilingo.

N-ro 67 (Sixth Year)

Melburno (Melbourne), Australio.

10 januaro 1926

ESPERANTO OFFICIALLY RECOGNISED.

Esperanto has just gained its greatest victory. The International Conference of the Universal Telegraphic Union at its sittings in Paris during September and October decided to give effect to the desire expressed by the League of Nations that Esperanto should be recognised in telegraphic communications as a "clear" language. This means that, (after a statutory delay of ten months), Esperanto may be used in telegraphic communication between one country and another at ordinary language, not code, rates. The decision shows that Esperanto is considered to be an auxiliary language sufficiently extensively known and used throughout the world as to be worthy of the right accorded to it. The technical commission of the Conference specially considered the claims of Ido but refused to make a similar recommendation in its favour. This would seem to put Ido out of court as a possible world language and it is to be hoped that its adherents can read the writing on the wall and will devote their energies to the support of Esperanto, without whose existence there could have been no piracy and mutilation of it under the name of Ido. The active support of the French delegates in conjunction with the

Paris Chamber of Commerce was an important factor in obtaining this outstanding success.

AUSTRALIAN ESPERANTO ASSOCIATION.

The Victorian section met on 11th December. The secretary reported that although subscriptions to K.R. had been forwarded no acknowledgment had yet been received. Information was received from Hobart that the members there were willing to arrange for the next congress to be held in their city. Mr. Rawson and Mr. Byatt were appointed to act as a Melbourne committee in connection with the Hobart groups. Mr. Byatt brought forward the motion of which he had given notice, viz.: "That it is desirable for the A.E.A. to establish a capital fund." This was agreed to and Mr. Byatt was asked to elab rate a scheme for the enrolment of individual members and to report to a meeting to be held on the 5th March. The secretary of each group throughout Australia is requested to forward to Mr. Byatt Box 731, Melbourne, the names and addresses of all Esperantists known to him.

LA TEORIO KAJ PRAKTIKO DE HENRY FORD RILATE LA DUNGADON DE FIZIKE DIFEKTITAJ VIROJ.

(Esperantigita de Alice Wicks laŭ la afabla permeso de Sro H. Ford.)

* * *

Neniu petante laboron estas malkceptata pro fizika difekto. Tiu ĉi plano de agado efektiviĝis la 12a Januaro 1914, en la tempo kiam la minimuma salajro fiksiĝis po kvin dolaroj por okhora labortago. Samtempe, alia kondiĉo determinis ke neniu estu maldungata pro fizika difekto, krom, kompreneble, en la okazo de infekta malsano. Mi opinias ke, se industria institucio plenumas sian plenan rolon, ĝi devas ebligi sektion de siaj dungitoj montri ĉirkaŭ la samajn proporciojn kiel sekcio de ia ordinara societo. Ĉiam ni havas la kriplulojn kaj lamulojn inter ni. Ordinare oni konsideras tiujn, kiuj estas fizike malkapabligitaj, kiel ŝarĝon sur societo kaj ni subtenas ilin per almozonado. Ekzistas kazoj, mi suposas, en kiuj la subteno necese fariĝas almozonado, kiel, ekzemple, idioto. Sed, ĉi tiuj kazoj estas eksterordinare maloftaj, kaj mi konstatis ke estas eble, inter la granda nombro de diversaj taskoj kiuj devas esti faritaj en la kompanio, ie trovi ŝancon, sur produkta bazo, por preskaŭ ĉiu. La blindulo aŭ kriplulo povas fari, en la preciza loko sur kiu li estas metita, egale tiom da laboro kaj laborakiri precize la saman pagon kiel tute nedifektita homo. Ni ne preferas kriplulojn, sed, ni elmontris ke ili povas gajni plenajn salajrojn.

Estus tute ekster la spirito de nia celo dungi homojn pro tio, ke ili estas kripluloj, pagi al ili malaltan salajron kaj kontentigi je pli malgranda produktado. Tio eble, rekte helpus la homojn, sed, ne helpus ilin en la plej bona maniero. Ĉiam la plej bona maniero estas tiu, kiu metas ilin sur produktiva, egaleco kun la nedifektita homo. Mi opinias ke ekzistas tre malofte okazo por almozonado en ĉi

tiu mondo—tio estas, almozonado en la senco de donacoj. Certe, negoco kaj almozonado ne povas esti kombinitaj; la celo de fabrikejo estas produkti, kaj ĝi malbone helpas la generalan komunumon se ĝi ne produktas ĝis la plej ekstremo de sia kapableco. Ni tro facile kredas sen esploro, ke la plena posedo de kapablecoj estas necesa kondiĉo por la plej bona plenumado de ĉiuj aferoj.

Por precizigi la situacion, mi klasiĝis ĉiujn diversajn taskojn laŭ la speco de maŝino kaj laboro—ĉu la postulata laboro estas malpeza, mezpeza aŭ peza; ĉu ĝi estas malseka aŭ seka laboro, kaj, se malseka, kia speco de fluidaĵo; ĉu ĝi estas pura aŭ malpura; proksima al forno aŭ fornego; la stato de la aero; ĉu estas devige uzi unu manon aŭ ambaŭ; ĉu la laboristo staras aŭ sidas ĉe sia tasko; ĉu ĝi estas brua aŭ kvieta laboro; ĉu ĝi devigas precizecon; ĉu la lumo estas natura aŭ arta; la nombro da pecoj traktitaj en horo; la pezo de la materialo traktita; la speco de la fortostreĉo al la laboristo. Tiu ĉi enketo montris ke en tiu tempo estis 7,882 diversaj taskoj en la fabrikejo. El ĉiuj tiuj 949 estis klasifikitaj kiel peza laboro bezonanta fortajn, fizike perfektajn homojn; 3,338 postulis homojn kun ordinara fizika kresko kaj fortoj. La aliaj 3,595 taskoj ne montris bezonon de fizika forto kaj taŭgas por la plej maldikaj, malfortaj specoj de homoj. Efektive, la plej multaj povus esti bone faritaj de virinoj aŭ pli agaj infanoj. La plej facilaj taskoj estis klasifikitaj denove por eltrovi kiom el ili devigas la uzon de plenaj kapablecoj, kaj mi trovis ke 670 povas esti faritaj de senkruraj viroj, 2,637 de unukruraj viroj kaj 10 de blinduloj. Tial, inter 7,882 diversaj taskoj, 4,034—kvaronkam kelkaj el ili postulas fortecon—ne bezonas plenan fizikan kapablecon. Tial vasta industrio povas provizi paglaboron por la norma homaro. Se la taskoj de la speciala industrio, aŭ ĉe la speciala fabrikejo estis anali-

HAROLD PUDNEY

Specialisto pri Fontanplumoj.

Se vi havas kriplan fontanplumon, kiu malhelpas vian skribadon portu ĝin al li, kaj li malkare rebonigos ĝin. Aŭ ĉu vi deziras fontanplumon POR VI MEM AŬ POR VIA AMIKO? Li havas multajn el ĉiu speco, je prezo facila por via monujo. Li speciale prizorgas mendojn per poŝto. Memoru la adreson

7 EQUITABLE PLACE, MELBOURNE.

zitaj same kiel la niaj, la proporcio povus esti tre malsama, tamen mi estas tute certa ke, se la laboro estus sufiĉe subdividata—subdividata de la vidpunkto de la plej severa ekonomio—estus neniam manko de lokoj en kiuj la fizike difektitaj povus fari taskon de normala homo kaj ricevi la saman salajron. Ekonomie, estas tre malŝpareme akcepti kiel ŝarĝon, kriplulojn, kaj, poste instrui al ili malgravajn taskojn kiel la plektado de korboj aŭ aliaj neprofitaj manlaboro, ne esperante helpi ilin, sed nur por ke ili ne senkuraĝiĝu.

Kiam la Dunga Fakoj dungas homon, la teorio estas doni al li taskon taŭgan por lia sanstato. Se li jam havas taskon, kiun ŝajne, li ne kapablas plenumi, aŭ li ne ŝatas, la taskon, oni donas al li transigakarton, kiun li alportas al la transiga fakoj, kaj, post ekzamenado oni difinas al li alian taskon por provi ĉu ĝi pli taŭgas lian sanstaton aŭ inklinton. Tiuj, kiuj estas fizike sub la normala stato fariĝas egale bonaj laboristoj, sur la ĝusta loko kiel tiuj, kiuj superas ĝin. Ekzemple, oni metis blindulon en la proviza fakoj por nombri ŝraŭbojn kaj ŝraŭbingojn sendigototajn al filiaj fabrikejoj. Du nedifektitaj homoj jam laboris super tiu tasko. Post du tagoj la ĉeflaboristo sendis letereton al la transiga fakoj, liberiganta la nedifektitajn homojn, ĉar la blindulo ne nur povas fari sian propran taskon, sed ankaŭ faris la laboron antaŭe faritan de la du sendifektuloj.

Ĉi tiun ŝparon oni povas pilargigi. Ordinare oni akceptas kvazaŭ konsensite ke kiam homo ricevas difektajn, li estas ekster la konkuro, kaj devas ricevi kompenson. Sed, ĉiam okazas periodo de resaniĝo, speciale en kazoj de ostrompaĵoj, kiam la homo sufiĉe refortiĝas por labori, ĉar la plej granda kompensado pro akcidento neniam povas egali la salajron de la viro. Se ĝi povus, tiuokaze la industrio nepre portus aldonatan imposton kaj tiu imposto evidentiĝus en la kosto de la produktaĵoj. Malpli da aĉetado de la produktaĵoj rezultus, kaj, pro tio, malpli da laboro por iu. Ĉiam oni devas memori ke tiu estus neevitabla rezulto.

Ni eksperimentis kun homoj longe kuŝintaj en lito—homoj kiuj povas rekta sidi en la lito—Ni metis ni-gravakstolajn kovrilojn sur la litojn

kaj difinis al ili la taskon kunigi ŝraŭbetojn kun la ingoj. Ĉi tiu estas laboro kiu devas esti manfarita kaj kiu ĉiam okupas dekkvin aŭ dudek homojn en la magneta fakoj. La homoj en la malsanulejoj povis ĝin fari egale bone kiel tiuj en la fabrikejoj, kaj, tio ebligis al ili ricevi la ordinarnajn salajrojn. Efektive, mi kredas ke ties produktaĵoj estis ĉirkaŭ 20 pro cento super la norma produktaĵoj de la fabrikejoj. Neniu homo estis devigita labori kontraŭvole. Sed ĉiuj mem tion deziris. Ĝi evitigis al ili la enuon. Ili dormis kaj manĝis pli bone kaj resaniĝis pli rapide.

Nenia speciala prizorgo estas necesa rilate al la dungitaj surdmutuloj. Ili faras sian laboron 100 pro cento. La tuberkulozuloj—kaj ordinare ĉirkaŭ 1000 estas dungitaj—ordinare laboras en la materiala savfakoj. Tiuj kazoj, kiujn oni opinias infektaj, laboras kune en budo speciale konstruita. Plejparte ili laboras en la libera aero.

En la tempo de la lasta analizo de la dungitoj, estis 9,563 subnormalaj homoj. El ĉi tiuj 123 havis kripligitajn aŭ amputitajn brakojn aŭ manojn. Al unu mankis ambaŭ manoj. Estis 4 tute blindigitaj homoj, 207 blindaj je unu okulo, 253 kun unu okulo preskaŭ blinda, 37 surdmutuloj, 60 epilepsuloj, 4 al kiuj mankis aŭ ambaŭ kruroj aŭ ambaŭ piedoj, 234 al kiuj mankis aŭ unu piedo aŭ unu kruro. La aliaj havis malpli grandajn malhelpaĵojn.

La tempo bezonata por spertiĝi pri la diversaj okupadaĵoj estas jene:—43 pro cento el la taskoj postulas ne pli ol unu tago de instruo. 36 pro cento postulas unu tagon ĝis unu semajno; 6 pro cento postulas unu ĝis du semajnoj; 14 pro cento postulas unu monaton ĝis unu jaro; 1 pro cento postulas unu ĝis ses jaroj. Ĉi tiuj lastaj okupadoj bezonas grandan lertecon—ekzemple la faradon de iloj kaj matricoj.

La disciplino tra la tuta fabrikejo estas severa (Pagoj el la aŭtobiografio de Henry Ford).

The Italian Esperanto Congress held at Bari in September was very successful. It was attended by ministers, senators, deputies and delegates from commercial, tourist and scientific societies.

RECENZO.

NOVELOJ, Henryk Sienkiewicz. Tradukita de Lidja Zamenhof. Internacia Mondliteraturo, volumo 16, eldono de Ferdinand Hirt & Sohn, Leipzig. Prezo, 1\$ 4p.

Principe pro sia romano, "Quo Vadis," la nomo de la Pola verkisto, Sienkiewicz, estas tre bone konata al Angloj. Kiam ni sciigis, ke Lidja Zamenhof, filino de nia Majstro, faras tradukon el lia verkaro ni atendis ion multe pli legindan ol ordinare. Eble pro tiu antaŭa taksado, nuanco de malkontenteco sentiĝis dum legado de la libro. El la kvin mallongaj noveloj, kiuj konsistigas la libron, eble la dua, "La Maljuna Servisto," vekos la plej grandan intercon. La fideleco, la jaluzo, la aroganteco, ĉiuj ĉi tiuj kvalitoj estas karakterizaj trajtoj de la maljuna servisto en ĉiu lando, kaj, legante pri Nikolao, la ĉiulanda legantaro rekonos bone konatan normon. La stilo de la tradukinto estas flua, kaj per la trafaj esprimoj, starigas komparojn kun la lingvaĵo de ŝia patro. Malsame, tamen, ŝi ne plene eluzis la fundamentajn vortojn, antaŭ ol enkonduki novajn. Laŭ la principo de sufiĉo povus esti neuzita la plimulto el la prefiksoj kaj sufiksoj, kiuj abundas sur ĉiu paĝo. Spite ĉi tiuj kritikindaj punktoj, la libro estas pliriĉigo de nia literaturo, kaj estas inda de lego de ĉiu samideano, eĉ sen la trudema sentimento, ke la tradukinto estas familiano de Zamenhof. (C.W.B.)

ESPERANTO CLASS BOOK, pre-tigita de F. Schoops, eldonita de La Verda Stelo Esperanto Group, Antwerp.

LINGVO INTERNACIA: kelkaj vortoj pri la esenco de Esperanto en Hebrea lingvo, kun aldono de la tuta gramatiko, kompilita de J. Muĉnik kaj N. B. Chavkin, havebla ĉe ili en Jerusalemo.

A course in Esperanto at Boston University, College of Business Administration, opened on October 20th, at 525 Boylston Street. Prof. Louis C. Lambert of the Modern Language department is the instructor, the "direct method" being used.

LA NAIVA MALJUNULO.

(Daŭrigo).

"Jes," diris la naiva maljunulo, "Mi havas kvardek funtojn por la luprezado de la pasinta duonjaro kaj kvardek funtojn por ĉi tiu duonjaro. Mia edzino diris ke ĉio estas en ordo, kaj ŝi estas lerta pri la kalkulado, mia edzino ja estas; kaj ŝi diris al mi ke tio estas, kion mi devas diri, se iu demandas min."

"Certe," diris la belega sinjoro, estas multaj ŝtelistoj vagantaj nuntempe, kaj vi devas paroli al neniu pri via mono, aŭ eble oni ŝtelos de vi." "Ho ne, mia edzino estas pli saĝa ol tio," diris la naiva maljunulo, ĉar ŝi metis la tutan monon en la selon kie neniu serĉus ĝin." Tiamaniere la paro, agrable trotetis antaŭen; kaj la maljunulo diris al si, ke li neniam renkontis belegan sinjoron, kiu estis tie afabla al li. La belega sinjoro lin demandis pri liaj ŝafoj, kaj kiamaniere li prizorgis ilin, kaj pri lia ĉevalino, Tib, kaj de kiam li posedas ĝin.

Kiam la maljunulo estis diranta al li, kia bela ĉevalidino Tib estis antaŭ nur dudek naŭ jaroj, la vojo kurbigis abrupte malsupren de monteto. Rivereto troviĝis ĉe la malsupro kaj arboj dense ĉirkaŭstaris; kaj ĉi tie, la belega sinjoro eltiris pistolon kaj direktis ĝin al la kapo de la maljunulo, dirante, "Staru senmove, kaj donu al mi vian monon."

Sed la naiva maljunulo lin surprize rigardis, kaj demandis, "Bonvole diru al mi, sinjoro, ĉu vi estas ŝtelisto?" La belega sinjoro respondis kun rido, "Estas pli bonaj nomoj por ĝi, ol tio, sed por kio vi deziras scii?"

Respondis la maljunulo, "Mia edzino diris al mi ke, se mi renkontos ŝteliston survoje, mi devas diri al li ke mi iras pagi la luprezon, kaj ke mi havas okdek funtojn en mia selo; sed ŝi ne diris al mi kion fari, se li min ordonis doni ĝin al li. Mi devas pensi mem, pri tio, sed, ja, mi ne povas tion fari saĝe tial mi nur ĵetos la selon trans la kreskajbarilon kaj maŝambarasos min de ĝi."

La ŝtelisto klinis sian kapon malantaŭen kaj ridis. "Via edzino neniel kulpigos vin se vi obeos ŝin tiamaniere. Tamen, vi nemiam scias, kio kontentiĝos virinon" li plue

diris. "Nu, provu kiel bone vi posas obei min," li diris. "Staru ĉi tie kaj tenu mian ĉevalon dum mi transiros la kreskaĵbarilon; kaj gardu bone mian saketon."

Ne estis facile grimpi trans la barilon ĉar ĝi estis el dornaĵoj kaj sovaĝaj rozoj; sed la ĝustan momenton kiam la ŝtelisto pasis tra ĝin, la naiva maljunulo metis sian piedon en la piedingon de la selo de la nobla ĉevalo de la ŝtelisto, kaj ekrajdis for. "Altu, kriis la ŝtelisto, kaj mi donos al vi la duonon de mia tuta havo."

"Mia edzino ne diris ion pri tio al mi" diris la naiva maljunulo, "kaj mi pensas ke ŝi ne aprobus ĝin se mi restadus. Si ordonis ke mi iru al la luiganto, kaj pagi la luprezon." Ĉe tio li rapidigis la ĉevalon kaj rajdis for ventrapide.

Estis nenio por la ŝtelisto fari krom sidiĝi sur la teron kaj ekzameni la selon. En ĝi estis nenio, ĉar, kiam la maljunulo pasis el la vidpovo de lia edzino, li prenis la monon el la selo kaj metis ĝin en lian bruston; ĉar li diris en si, "viro devas esti la estro de lia propra domo kaj mi faros pri la mono kiel plaĉas al mi. Mi ne estas iomote timema."

La maljunulo neniam antaŭe sidis sur tia nobla ĉevalo kaj neniam havis tian galopon en sia tuta vivo, kiel li havis tian matenon. Kiam li atingis la domon de la luiganto, li malfermis la saketon, kaj la luiganto fikse rigardis surprizete, ĉar en ĝi estis kvindek funtoj el oro, krom multe da funtoj el argento. "Kie vi ricevis kiom da mono?" la luiganto demandis, kaj la naiva maljunulo respondis, "Mi renkontis homon survoje, kaj ni interŝanĝis ĉevalojn; li donis al mi tiun ĉi saketon da mono kaj li havas mian malnovan selon."

Mi pensas, ke vi devus ne porti poŝe tiel multe da mono," diris la luiganto, kaj la maljunulo respondis "Mi pensas ke neniu malutilus al tia naivulo, kiel mi estas, kaj cetero, mi ĉiam faras kion mia edzino diras al mi fari, ĉar ŝi estas lertulino, kaj povas kalkuli. Eble la homo kiun mi renkontis ne obeis sian edzinon."

La naiva maljunulo ne reiris hejmen laŭ la ĉefvojo, sed laŭ mallarĝa vojeto; kaj baldaŭ li ekvidis maljunan Tibon paŝtantan sin sub arbo. Tiam la maljunulo, kaj Tib kaj la nobla ĉevalo iris hejmon kune, kaj kiam

lia edzino vidis la monon ŝi dancadis pro ĝojo, kaj diris "Nu, maljunulo vidu kion vi ricevas, obeante vian edzinon."

PETOLAĴO.

Kiam la frato kaj mi estis junaj knaboj, ni ofte faris petolaĵojn. Proksime al nia domo loĝadis en malgranda dometaĉo Irlandano nomata Johano Dornanto. Li estis fosisto, kiu fosadis la oran metalon sed li gajnis nur malmulte da oro. Kiam ajn li ricevis sufiĉe da mono li elspezis ĝin en drinkejo. Unufoje li ŝtelis lankovrilon el butikoj kaj policano lin kaptis kaj enmetis en la malliberejon. Kiam, en la sekvanta mateno li staris en la juĝejo, la magistrato demandis al li, "cu vi estas kulpas?" kaj li respondis—"Ne! via Magistrato Moŝto!"—Mi nur prunte prenis ĝin ĝis post la vintra vetero, kiam mi intencas redoni ĝin al la butikisto.

Unufoje la frato kaj mi trovis mortintan igvanon kuŝantan sur la vojo. La igvano havis pli ol ses futojn da longeco. Ni, la frato kaj mi, ligis la beston al bastono kaj marŝis rekte al la dometaĉo de Johano. Alveninte tie, ni aŭdis sibilantan sonon de kuiriganta viando. "Johano kuiras sian tagmanĝon." La frato grimpis ĝis la supro de la tegmento kaj mi ĝis la supro de la malalta kamentubo. Mi tenis la igvanon per la fingroj pendis ĝin en la kamentubo kaj lasis ĝin fali en la fritilon sur la kuirigantan viandon.

Tuj mi malsupren iris de la kamentubo kaj rapide forkuris. La frato trafalis tra la tegmento, sed Johano postkuris min, tamen li ne povis min kapti. La frato forkuris hejmen. Post duonhoron ni reiris al la dometaĉo de Johano. Li diris al ni—vi estas filoj de la diablo, sed mi pardonas al vi, tamen ne faru tiun ĉi abomenaĵojn ree, aŭ mi certe mortigos vin.

Vera rakonto "La Migranto."

Dr. Lehman Wendell, the President of the Twin City Esperanto Club, is teaching the Esperanto class at the University of Minnesota this year.

KRONIKO.

AUCKLAND, Nov-Zelando. Oni raportas ke la Aucklando klaso nun kreskas kaj posedas dudek anojn. La sekretariino estas, s-ino A. E. Dewing, 5 Aldred Road, Remuera, Auckland.

DUNEDIN, Nov-Zelando. Laŭ informo, f-ino McCarthy, 66 Harbour Terrace, Dunedin, gvidas lernklason kaj agas diligente por Esperanto rilate al la Sud-marara ekspozicio.

MELBURNO, V.—La alveno de familo Sekfy el Hungarujo, kaj la reveno de s-ro Hudson el sia ekskurso al Sud-Afriko kaj Sud-Ameriko, donis plezuron al la Melburna Esperanto-Societo. La klubo tutkore akceptis gesinjorojn Sekfy kaj pro ilia honoro aranĝis viziton al la Botanikaj Ĝardenoj.

Aliaj eroj en la programo estis ŝaradoj, kiuj donis amuzon al la aŭskultantoj; kaj la ĉiumonata debato. La temo estis "Ĉu sinjoro devus doni sian sidlokon al sinjorino?" Ĝi estis la plej sukcesa el la debatoj, kaj elvokis multajn amuzajn opiniojn de la partoprenantoj.

WELLINGTON, N.Z. — Klaso de Esperanto estas aranĝita sub aŭspicoj de la W. E. A. (Laborista Eduka Asocio). La sekretario de tiu asocio, dankante s-ron W. L. Edmanson pro ties klopodoj pri la afero, bedaŭris ke tempo ne permesis la fondiĝon de klaso lastan jaron. Tamen, la klaso komenciĝos je frua dato, kun s-ro Edmanson gvidanta ĝin.

Per tiu ĉi klaso oni esperas antaŭenigi Esperanton en la ĉefurbo kie la lingvo ne estas tre forta; ankaŭ oni esperas ke aliaj sukcesoj sekvos la klopodojn de la Nov-zelanda pioniro.

Some months ago "La Suda Kruc" mentioned that a powerful station then in course of construction at Bilbao, Spain, was favourably inclined to Esperanto. Its first Esperanto talk was given on November last. As this station is heard in England, Ireland, France, Belgium, Holland, Austria, Switzerland, Italy, Northern Africa and part of Germany, the wireless Esperantists of those lands will doubtless make a habit of listening in to "Radio Vizcaya."

AL MATENA SUNO.

Saluton sun' matena, ruĝkolora
patrino ĉarma de la pura ĝoj.
Baniĝas ter' en via lumo ora,
ĉiellazuro estas via voj.'

Montaro kronojn levas flamlumitajn
kaj preĝas arboj, herboj de turkis'.
Matenkreskaĵoj florojn rosumitajn
al vi etendas ame por la kis'.

Leviĝis mi, mizera tera sklavo,
kun korsopir' je ĉi altaĵ' sen fin',
Forlasis koton de l'malseka kavoj
kaj dum la nokt' atendis vin patrin'.

Saluton, sun' donanto de la vivo!
Vi kisis min ĉe via reaper'.
Lastnokta dorm' en rokoj de deklivo
flugilojn agloj skuas en liber',

Nun iras mi de vi, ho sun', ravita,
Tra montoj, valoj sklavo en liber'.
La pentofero estas plenumita —
mateno nova lumos tuj sur ter'.

Putinas. Esperantigis P. Lapiene.
(El "Tagiĝo.")

RECEIPTS (SUBSCRIPTIONS).

Up till 31st December the following sums were received, (the figures in brackets indicate the month and year to which payment is made):—
H. S. Rienits, 4/6 (5/26); A. Bennett, 4/6 (10/26); J. B. Henry, 4/6 (5/26); C. M. Pocklington, 4/6 (7/26); P. T. Hudson, 4/6 (7/26); P. T.B.H., 2/6.

Dr. Nuyts, President of the French Association, "Esperanto and Commerce," died suddenly on Aug. 19. Dr. Nuyts was a doctor of medicine and at one time a professor in Paris, where, during the war, he was successful in the treatment of facial wounds. He then devoted his attention to the study of the mouth and teeth and put on the market a toothbrush of his own design. Since the war he devoted himself to the manufacture and marketing of "Dentclair" brushes. He was a modern "master of industry" and utilised to the full the American methods of publicity. It was largely owing to his efforts and support that the Paris Commercial Conference was so successful.

ESPERANTO OFICIALE REKONITA.

La Internacia Konferenco de la Membroj-Ŝtatoj de la Universala Telegrafa Unio ĵus rekonis oficiale Esperanton laŭ la rekomendo de la 5a Plenkunsido de la Ligo de Nacioj. Artikolo 7 de la Internacia Telegrafa Regularo antaŭvidis la uzon de la naciaj lingvoj kaj de l' Latino. La lasta paragrafo finiĝas jene:

"La uzo de l' Latino kaj de Esperanto estas sammaniere allasata."

La franca delegacio aktive kunhelpis al la adopto de tiu amendo, kiu donas al Esperanto definitive la karakteron de oficiale rekonita internacia helplingvo.

Simila propono koncerne Idon estis malakceptita.

QUEENSLAND NOTES.

"The Advocate," Queensland, which is the official organ of the railway workers in that state, is printing a series of articles on Esperanto. The writer is Mr. P. D. Thomson, a well known esperantist. The first article appeared in the November issue. In passing it may be said that many newspapers in Europe and Asia, with large circulations, are now yielding to a demand, by publishing news in the international language, as well as in the national language. Doubtless the increased circulation, induced by printing news in such a manner that people of all nations may read it, warrants this progressive step.

The Workers' Educational Association, Ipswich branch, has started a class for the study of Esperanto. The hon. sec. is Mr. Phillip Burr. The effort of the promoters is meeting with the success which it certainly deserves. Other branches might follow the commendable example of the Ipswich members with advantage.

In Denmark a little nine year old blind boy has taught himself Esperanto at home, and is now corresponding with other blind children in six foreign countries in Esperanto. At the last Danish Esperanto Congress this lad read Hans Christian Andersen's, "The little mermaid," in Esperanto to the Assembly.

HERE AND THERE.

The third congress of the members of the Aerial Navigation League at its meeting in Brussels passed a resolution stating that it recognised the value of Esperanto and appointed an International Commission to set out the measures necessary to be taken to secure its use as the technical language of aerial navigation. Ernest Archdeacon, Henry Farman, well-known pioneers of aviation, General Delcambres, director of the French Meteorological Department, Torresy Quevedo, the famous Spanish mathematician and Major Emilo Herrera, Director of Aeroplane construction, Madrid, were among the supporters of the resolution.

A new group, the Zamenhof, has been founded at Buenos Aires. The president is Lucas Acuna, Secretary, Manuel M. Guell, Treasurer, A. G. Porto, acting with E. Pertini, G. Rodriguez as a committee. The programme includes free personal courses and also instruction by correspondence.

The monthly Esperanto talks from 3LO, Melbourne, are being continued. On December 5, Mr. Rawson spoke on "Recent successes of Esperanto in Europe," and on Jan. 2 Mr. Drummond's theme was "The acid test on Esperanto."

The Sydney Mail of Dec. 2nd contained the following:—"Esperantists have great hopes in wireless and—who knows?—they may give the world the wireless language. It is certain that the time is not far distant when the nations must understand each other more easily. The present and the past have been divided as with an axe."

Winifred M. Winspear, George Winter, Harry L. Whyte-Meach, Sydney, recently passed the B.E.A. preliminary examination and Alexander Auhart, H. R. Torr, Mrs. A. Taylor, and D. Healy were successful in the advanced examination.

Most Esperantists will rejoice to learn that Czecho Slovakia postal authorities will not handle "migranta" postcards and hope that this will be the attitude taken by all other postal authorities.

Miss Genevieve Coy, has organized an Esperanto class in Cleveland, Ohio, made up of members of the Bahai group.

GAZETOJ RICEVITAJ.

Administracioj bonvole sendu siajn ĵurnalojn la! ĉi tiu adreso — "La Suda Krucio," Box 731 F, P.O., Elizabeth-st., Melbourne, Australia": — Arbeiter Esperantisten, 7; Amerika Esperantisto, vol. 35, 1; Bulteno Antverpena, 10; Esperanto and Commerce, Paris; Heroldo de Esperanto, 81 ĝis 88; Informservo De Labora Oficejo, 100, 101, 193abc; International Language, 9, 10, 11; Litova Stelo, 10, 11; La Semisto, 51/2, 53-4-5; La Orienta Lumo, 2, 3; La Ridanta Esperantisto, 2; Oomoto, 10, 11; Nova Sento, 5; Svenska Esperanto-Tidningen, 9, 10; British Esperantist, 248; Samosa Esperantisto, 1, 2 (eld. Samosa Esperanto Society, abono 1 dolaro jare). Laĉiulande publikigataj ĵurnaloj estas, kiel konate, tiel multenombraj, ke Esperantistoj kutimis vidi kun kelka bedaŭro la aperon de nova Esperanta ĵurnalo, ĉar ili pensas, ke tro multe da periodaj Esperanto publikigaĵoj serioze malfortigas la disvastiĝadon de la nun ekzistantaj ĵurnaloj, ĉiuj, pli kaj pli indaj je konstanta subteno.

Tamen krom la fakto, ke por la ĉiulandaj Esperanto ĵurnaloj ne ekzistas kaŭzo kial ili timus konkurdon de nia senluksa kaj senpretenda dumonata organo, ni ankoraŭ opinias, ke se ne multaj, unu almenaŭ ĵurnalo devus publikigi en ĉiu pli malpli esperantigita lando. **Literaturo.** (Londono) 28. Antaŭ kelkaj monatoj la Brita Esperantista Asocio starigis komitaton, kiu havis la devon konsideri serioze kaj amplekse la estontecon de la Asocio, ne nur finance sed ankau en ĉiu rilato.

Tiu komitato rekomendis interalie, ke Literaturo ĉesu aperi kiel kvaronjara gazeto, kaj sekve ĉi tiu estas la lasta numero.

2K.Y., The Sydney Trades Hall broadcasting station, proposes to transmit a complete course of Esperanto lessons shortly.

Melburna Esperanto-Societo, Prezidanto, s-ro C. W. Ballard; sekretario f-ino V. Cox. Poŝta adreso, Box 731F, Elizabeth-str. P.O., Melbourne. Kunvenejo: Public Benefit Bootery Building, 5th Floor, 323-325 Bourke St., Melbourne. Vendrede vespere, je la oka horo.

Hobarta Esperanta Grupo. Kunvenejo: Eaton-Bray-lernejo, Davey-str.; ĉiun duan mardon, 7.30 vespere. Prezidantino F-ino C. M. Hannaford. Sekretario kaj poŝta adreso F-ino A. Beckett, 177 Davey-str., Hobart.

"Iru Antauen"-Grupo. Prezidantino: S-ino E. S. Bigelow. Sekretario, S-ro J. Parker. Poŝta adreso, Warrigal Rd., Oakleigh. Kunvenejo: 36 Kangaroo Rd., Oakleigh, marde vespere, je la oka horo.

"Nigra Cigno"-Grupo. Prezidanto S-ro E. J. Goody, Sekretariino F-ino F. Cherrett. Poŝta adreso, 46 Leonard str., Victoria Park, W.A. Lernantoj kunvenas ĉe Perth Academy, 8 horo, merkrede; progresintoj, 277 Hay-str: 8 horo lunde.

Persista Grupo, Armadale, Melbourne. Prezidanto: S-ro H. Byatt. Sekretariino: F-ino I. Thomas. Kunvenejo kaj poŝta adreso, 37 Brunel St., East Malvern, merkrede vespere, je la oka horo.

Sydney Esperanto Society. Kunvenas ĉiun ĵaŭdon de 7.45—10 pm. ĉe "Rawson Chambers," Rawson Place (5a etaĝo, ĉambroj 580-583). Ĝuste apud la ĉefstacidomo. Prezidanto: S-ro F. V. Taylor; Sekretario: S-ro L. E. Pfahl, 150 George's River Road, Croydon Park, Sydney.

Cole's Book Arcade, Melbourne.

TWO MILLION BOOKS AND PIECES OF MUSIC.

— Send for —

"THE RAINBOW," Cole's Monthly About Books. FREE TO YOU.